

# NEDERLANDA KATOLIKO

Maandblad, officieel orgaan van de Nederlandse Bond van Katholieke Esperantisten „Nederlanda Katoliko”  
Gevestigd te 's-Hertogenbosch.

Opgericht 29 Augustus 1909.

Bisschoppelijk en Koninklijk goedgekeurd.

Ĉion per amo, nenion per forto. (S. Franc. de Sales)

Geestelijk Adviseur: HUB. J. A. M. ERAS, Pastro.

Abonnementsprijs	Adres der Redactie:	Afzonderl Nos.
f 2,50 per jaar	P. M. BROUWER	20 cent.
Eksterl. Jarabono f 3,—	Pahudstraat 134	Advertentiën
	's-Gravenhage.	50 cent per regel.

**ADVERTENTIËN: DRUKKERIJ PIET SMITS, TILBURG**

## LA TEATRAĴO DE NIA DEKNAŬA.

La kongreskomitato de „Nia XIX-a”, intertraktante kun la klubo „Suda Kruco” el Eindhoven pri prezentado de teatraĵo dum nia internacia kongreso, esprimis la deziron, ke tiu teatraĵo estu verko de Vondel, la plej granda poeto Nederlanda (1587-1679), kaj ĝi por tio havas du motivojn.

Unue: la kongreso okazos en Nederlando, kaj pro tio ni ĝin uzu por plikonigi nian Nederlandan literaturon. Due: ĉi-jare Nederlando festas la 350-an datrevenon de la naskiĝo de Vondel, kaj por inde memoriĝi lin, oni en diversaj lokoj ludas liajn teatrajn verkojn. Komprenoble, dum nia kongreso ni nur povas uzi Esperantan tekston. Nur unu teatraĵo de Vondel ĝis nun aperis en nia mondlingvo: Gysbrecht van Aemstel, tradukita de S-ro Ing. J. R. G. Isbrücker (eldono: W. J. Thieme, Zutphen, Nederlando). Ĉi tiu verko tamen havas pli lokan signifon: ĝi prezentas epizodon el la historio de Amsterdam. Pro tio la kongreskomitato preferis la biblian dramon „Jozef en Dotan”, kies historio per la Biblio estas mondkonata. Ĝi pro tio estos pli facile komprenbla kaj pli interesiga por la internacia aŭdantaro.

Nia klubo tuj komencis la tradukon de ĉi tiu verko kaj ĝian studadon. Baldaŭ la teksto aperos kun kelkaj klarigaj notoj, kaj estos je modera prezo havebla ĉe la sekretario de „Suda Kruco” (F-ino M. Groels, Hoogstraat 181, Eindhoven, Nederlando). Mi ĉi tie volas priskribi tre koncize ĝian enhavon por havigi al la legantoj de ĉi tiu organo ideon pri ĝia aranĝo, kaj por veki iom da intereso por ĝia prezentado dum la vespero de la 2-a de Aŭgusto.

La agantaj personoj estas: Jozef, kaj liaj fratoj: Simeon, Levi, Judas kaj Ruben, kaj plue la karavanestro, kun kiu la fratoj intertraktas pri la vendado de Jozef. La dramo konsistas el kvin aktoj. Ĉiuj aktoj, escepte la lasta, finiĝas per ĥoro de anĝeloj. La muzikon por tiuj ĥoroj verkis jam en 1888 lia Moŝto W. P. H. Jansen, sacerdoto, tiama seminaria profesoro. Tiun muzikon ni laŭeble adaptis al la Esperanto-teksto. La anĝela ĥoro ankaŭ komencas la unuan akton, — tamen ne kantante, sed deklamante. — por enkonduki Jozef ĉe la aŭdantaro.

Kiam la kurteno leviĝas, la scenejo prezentas pejzaĝon en Palestino. Meze ni vidas malnovan puton, apud kiu kuŝas dormante Jozef. Duoncirkle lin ĉirkaŭas la anĝeloj, kiuj lin gardis kaj gardos dum lia longa vojo, kies celon ili rakontas:

Jen Jozef, fil' de Raĥel, de Jakob subten'  
En erikej' dormanta dolĉe gis maten'  
Ĉe puto flanke de al Dotan la grandvojo,  
Laŭ kiu kuŝas la paŝteĵ', kie kun ĝojo  
En kor' li serĉas siajn fratojn.....

Ili plue rakontas pri la granda estonto, kiu lin atendas post multe da sufero. Dume Jozef vekigigas kaj leviĝas. La anĝeloj malaperas, kaj nun Jozef komencas sian paroladon. Vondel bele lin priskribigas la pejzaĝon, kaj poste Jozef rakontas pri terura sonĝo kiun li ĵus havis pri naŭ serpentoj:

Timiga ja aspekt'! La de l'okuloj bril'  
Traboris la mallumon, kaj mi vidis mil  
Lumetojn sur la skvamoplenaj dorsoj brili  
En blua or' nebula; korpojn volvis ili  
En bukloj sen ripoz'.....

Ĉe la fino de sia monologo Jozef diras:

Anĝel' gvidinta patron al gepatra dom'  
Al urbo Dotan gvidu min en Dia nom'!

Li foriras, kaj samtempe reaperas sur la scenejo la anĝeloj, kiuj en kanto, respondkanto kaj plukanto bele prilaudas la Dian Providencon, kies planojn la homoj ne konas, sed kiuj ĉiam kondukas al feliĉo de la homaro, kvankam ofte laŭ dorna vojo, kiel ĉe Jozef:

Tiel do Jozef, laŭ valor'  
Montrante sin boneganima  
Junul', sin montras plej sublimes  
Post persekuto kaj dolor'.

Post profetaĵo anĝela pri la estonta gloro de Jozef finiĝas ĉi tiu unua akto, kiu fakte nur estas enkonduko al la dramo mem.

La scenejo dum la dua akto montras alian pejzaĝon: enombrian lokon en la sama regiono. La puto nun ne estas videbla. Ĉi tie sidas tri fratoj de Jozef: Simeon, Levi kaj Judas. Ili kontrolas kaj gardas la brutaron kaj interparoladas. Dum la konversacio ili malproksime vidas iun marŝanta en la direkto de Dotan. Fine oni rimarkas, ke tiu persono estas Jozef, la revulo, kaj nun en ili revekiĝas la envio kaj ĵaluzo, ĉar Jozef havas la preferon de ilia patro Jakob. Nur Judas iom kontraŭparolas: li timas la konsekvencojn, ĉar la fratoj volas mortigi Jozef.

Vidante, ke ili ne volas aŭdi liajn argumentojn, li fine memorigas, ke Ruben estas la plej aĝa frato, kaj ke do ties voĉo tre valoras:

Se Ruben ne konsentas, planas vi en van':  
Streĉate sen akord' la snur' devas rompiĝi.  
Jen Ruben venas. Mi lin volas konsiliĝi.

Al kio Simeon, forirante kun Levi, respondas:

Vi faru! Sed atentu bone pri la vort':  
Se vi kontraŭas, vin minacas sama sort'!

Ruben alvenas, kaj al li Judas rakontas pri la plano de la fratoj. Ruben ektimas kaj koleriĝas, sed Judas nun disputas kun li, ĉar li timas siajn aliajn fratojn, kaj pro tio ne kuraĝas preni la partion de Ruben kaj Jozef. Kiam Ruben diras, ke li malhelpos la agadojn de siaj fratoj, Judas respondas:

Vanhelpos vi al knab', malprofitigos vin.  
Jen ili! Ne forgesu vian senhelpecon.  
Iliaj la okuloj montras murdemecon!

Komencas nun la interparolado de Ruben kun la aliaj fratoj. Judas silentas. Vane Ruben pledas por Jozef. Belega estas la priskribo de la „Ĝnio”, kiun Vondel komparas kun „terura monstro”:

Venen' pezigas langon, siblas pri fisentoj  
En ĝia buŝ'. Kaviĝas vangoj sub la krust'  
El ŝimo; verda gal' puŝiĝas el la brust'.  
Homsangon ĝi sorbtrinkas, ĝue gin travadas.  
Ostar' nur estas korpo: nure ĝin formadas  
Sensukaj, senmedolaj ostoj. La ĉagren'  
Gin nure priĝojigas.

La fratoj komencas riproĉi, insulti, kaj, kiam fine la disputo minacas finiĝi per murdatako, Judas intervenas. Nun Ruben proponas,

ke okazu al la knab' neni'  
Antaŭ ol la ĉi-tago estos forpasinta.

Tiun proponon oni akceptas, kaj decidas provizore meti Jozef en la puton, por poste murdi lin. Ĉi tie la dua akto finiĝas. La anĝelhoru revenas, kaj prikantas la virtojn de Jozef, la „antaŭulo de Kristo mem. Jen la „plukanto“:

Belesti devas antaŭulo  
De perfektaĵo sen makulo.  
Kiu antaŭas sur ĉiel'  
La sunon, fonton de klareco,  
La Dian bildon de vereco?  
Kiu, se ne la Matenstel'?

Ĉe la komenco de la tria akto Jozef alvenas ĉe siaj fratoj. La scenejo estas la sama kiel dum la dua akto. Malafable oni lin akceptas, lin primokas pro liaj revoj, laŭ kiuj li iam estos ilia reĝo. Oni forkondukas Jozef al la putu.

La scenejo subite ŝanĝiĝas. Denove ni vidas la pejzaĝon de la unua sceno kun la putu en la mezo. Ruben venas kaj parolas pri sia plano: li volas savi Jozef, kiam ĉi tiu estos en la putu. Li vidas la fratojn kun Jozef proksimiĝantaj:

Sed nun silentu mi. Jen venas la fratar':  
Antaŭe Jozef. Ho, kia venĝkria far'!  
La kara knabo viŝas larmojn el okuloj.  
Ho tigroj! Ĉu vi vere estas eks-homuloj?  
Kaj ĉu vi de l'homeco portas ŝajnon nur?

Li kaŝas sin malantaŭ arbetaĵo. La fratoj venas, kaj dum riproĉoj kaj mokado oni devigas Jozef eniri la puton. Tiam ili interparolante foriras. Ni nun aŭdas la plendojn de Jozef en la putu:

Ho Dio mia, ĉu do restos vana  
Ploradi mia? Ĉu via vizaĝ'  
Kaŝiĝas antaŭ la okul' infana  
En tiu ĉi kaverno, putkavaj'?

Ruben singarde reaperas, kaj promesas al Jozef, ke li revenos por savi lin el la putu. Kiam li foriris, la anĝela ĥoro revenas, kaj finas ĉi tiun akton per kantoj pri la belecoj de Jozef, kaj antaŭdiras lian gloran estonton:

Leviĝos li, kaj en palacoj,  
Kie saĝulaj la sagacoj  
Al homo ne sufiĉas, li  
Per saĝo sia, grac' de Di'  
Brilados.

Kaj en la „plukanto“ ili priskribas la feliĉan vivon estontan de la Israelidoj en Egipto sub la protekto de Jozef:

Mi vidas la Jakob'ajn idojn  
Paŝtantaj, bruton kaj brutidojn  
Ĉe l'alta arb'...

La kvara akto ree donas la scenejon en ombra loko, kie la fratoj ripozas, manĝas kaj trinkas. Precipe Judas sin montras maltrankvila. Subite oni vidas karavanon kiu alproksimiĝas. Tio havigas al Judas la ideon vendi Jozef el la Araboj, anstataŭ mortigi lin. La fratoj konsentas. Judas prizorgos la vendadon. La scenejo ŝanĝiĝas, kaj nun ree montras la pejzaĝon, kie troviĝas la puto. Denove ni aŭdas la plendojn de Jozef, kiuj jene finiĝas:

Venu do, ho Ruben; la dolor'  
Per larmoj mian korsopiron pli emfazas.  
Ho Ruben, vi konsolu al la mia kor'!  
Mi ion aŭdas! Kio eble nun okazas?

Venas la karavanestro, kiu intencas iom ripozi dum la karavano starigas la tendojn por restadi ĝis sunsubiro. Judas venas sur la scenejon. La karavanestro aŭdas la ĝemadon de Jozef, kaj Judas klarigas, ke en la puto troviĝas juna sklavo pro puno. La karavanestro proponas aĉeti lin. Judas eligas Jozef el la puto, kaj Jozef estas vendata por dudek arĝentmoneroj.

Aŭdu nun, kiel Jozef alparolas sian novan mastron. Li antaŭe lin atentigas pri la iama sorto de Ismael (prapatro de la Araboj), kiam ĉi tiu de Abraham estis kun sia patrino Agar forpelita en la dezerton. Tiam li daŭrigas:

La Di' de Ismael vin benu  
Sur via voj' al horizont'  
Malproksimega, kaj vi venu  
Prosperere ĉe la via cel'  
Kun mi, libera hom' vendita  
Maljust kiel sklavo el  
La rond' de mia gent' blindita.  
Ismaelido, traktu min  
Afable. Dio benu vin!

Denove la anĝelhoru finas ĉi tiun kortuŝan akton per belaj kantoj, en kiuj ili komparas la Feniks' on fabelan de la Araboj kun la vera Feniks, Jozef, kiun ili nun posedas. La anĝeloj antaŭdiras, ke Jozef post sia morto ripozos en tombo en Siĥem (la lando, kie nun li troviĝas):

Tie li mortos, kaj ĉe l'Nil'  
Filparo por enbalzamig',  
Idaro por la enterig'  
Zorgados: tra flueg' kaj mar'  
Lin entombigos granda ar'  
Da dankemuloj en Siĥem,  
Donac' de l'patro, pro laŭdem'.

Ĉe la komenco de la kvina akto revenas Ruben ĉe la puto por realigi sian planon. Sed li trovas la puton malplena! Nun li kriegas kaj plendegas, preskaŭ freneza pro malĝojo. Tiun animstaton Vondel majstre pentras. Ruben foriras por serĉi Jozef. La scenejo ŝanĝiĝas, kaj ni vidas Simeon kaj Judas interparolantaj pri la vendado. Dum tiu konversacio venas Ruben ĝemante. Pruviĝas nun la savplano de Ruben, kaj tio denove kaŭzas disputadon inter la fratoj, disputadon, kiun Judas sukcesas haltigi, kiam Levi alvenas kun la vesto de Jozef. Tiu vido ege kortuŝas Ruben. Li prenas la veston, kaj tiam diras versaĵon, konata inter le tuta Nederlanda popolo:

Plumaro de la kolombet'  
Kaptita de la akcipitroj

.....

Levi kolorigas poste la veston per sango, por ŝajnigi, ke sovaĝa besto disŝiris Jozef. Ruben abomenas tiun trompagadon. Tiam Levi disdividas la monon ricevitan pro la vendado de Jozef. Komence Ruben ne volas akcepti sian parton:

Sangmono! For de mi! Neniam, ĝis la fin'  
De mia vivo ĝin akceptos! Mi rifuzas!

Fine Ruben kontraŭvole akceptas, kaj nun la frataro decidas reiri al Hebron, al patro Jakob, al kiu oni antaŭsendos serviston kun la vesto. Kaj dum ili ekmarŝas, Ruben, restante sur la scenejo, parolas la lastajn versojn de la dramo, en kiuj li pentras la konsterniĝon, kiun kaŭzos en la domo de Jakob la sciigo pri la (laŭmensoga) morto de Jozef. Ĝi estas inda fino de la belega dramo. Jen citaĵo el tiu fino:

Jen trempaŝante venas  
La blinda avo el la pordo, dum subtenas  
Servisto lin subbrake. Kara rigidul;  
Vi danku la blindecon vian, ĉar okul  
La via ne suferas pro la vid' de l'vesto.  
Nur palpi povas vi: jen nura la atesto  
Por via cent kaj sesdeksepa jaro....

Kaj tiu parolado finiĝas per ĉi tiuj famkonataj versoj, kies vereco ĉiutage pruviĝas:

Gepatroj la infanojn flegas en dolor':  
Etul' sur vesto paŝas, pliaĝul' sur kor'!

La Nederlanda nacio fieras pri poeto kia estas Vondel. La Nederlandaj katolikaj Esperantistoj ĝojas, ke ili havas la eblecon, konigi sian majstron al alinaciuloj. La klubo „Suda Kruco“ faros sian eblon, por fari tiun servon al la Nederlanda nacio, kaj al Esperanto.

SUDAKRUCANO.

# VAN HET HOOFDBESTUUR.

## NIEUWE AFDEELINGEN.

Zijn opgericht te Kloosterzande, Hoensbroek, Brunssum en Vaals. Als onderafd. van „Por Nia Kredo” te Breda is aldaar een Katholieke Arbeiders-Esperantistenafd. opgericht.

De adressen der secretariaten vindt men vermeld in achterstaande lijst.

Besturen en leden hartelijk welkom in ons bloeiend „Nederlanda Katoliko”.

## JAARBOEK I. K. U. E.

Ter uitreiking aan de leden zijn aan de afd-secretariaten de noodige jaarboeken toegezonden. De verspreide leden ontvangen het inmiddels reeds per post.

Aan verzoeken om toezending van meer exemplaren kan niet worden voldaan.

## HOOFDBESTUURSVERGADERING.

Het Hoofdbestuur zal op 13 Juni te 's-Hertogenbosch in vergadering bijeenkomen.

---

---

# „NIA DEKNAŬA”.

## XIXa KONGRESO DE I.K.U.E.

HAGO, 1a - 6a DE AUGUSTO 1937.

### SESA KOMUNIKO.

Nur ankoraŭ du monatoj, kaj jam komencos „Nia Deknaŭa” en Hago! La nombro de la aliĝintoj ĝis nun ne ankoraŭ estis tre granda. Ni scias, ka plejparte la Esperantistoj kutimas ne tre frue aliĝi al niaj kongresoj. Pro la necesaj preparoj tamen estas necese, ke de nun la katolikaj Esperantistoj ne plu atendu, kaj en la monato Junio *grandare aliĝu al nia katolika kongreso.*

### Kongrestemoj.

La estraro de I.K.U.E. decidis, ke du temojn oni pritraktos dum la kongreso.

- 1o. La katoliko en la publika vivo.
- 2o. Kunlaboro de I.K.U.E. kun A.M.J.C. (Apost. Maris Int. Conc.).

La festkunveno de Mardo posttagmeze estos dediĉata al la Ora Jubileo de Esperanto (1887 - 1937). La vesperon de la sama tago okazos Literatura Konkurso.

### Fotografado.

La oficiala fotografado de la kongresanaro okazos tuj post la oficiala malferma kunveno, London, la 2an de Aŭgusto, post-tagmeze.

### Sanktaj Mesoj.

Sanktaj Mesoj estos legataj ĉiutage en la Preĝejo de Sankta Jakobo, Parkstraat. Dum la Sanktaj Mesoj okazos predikoj en Esperanto. Predikos diversaj nederlandaj kaj eksterlandaj pastroj.

### Kongresejo.

Akceptejon, poŝtoficejon, salonon por korespondado oni aranĝos en la kongresejo „Ridderzaal” (Kavalira salono)

### Loĝado.

La loka komitato prizorgas loĝadon en hoteloj por kiuj deziras tion. — Oni disponas ankaŭ pri 100 litoj ĉe privatuloj je malkara prezo de 1 guldeno por loĝado kun matenmanĝo.

### Kongreskartoj.

Kongreskarto . . . . .	2 <sup>1</sup> / <sub>2</sub> ned. guldeno.
Helpkongreskaro . . . . .	1,— ” ”
Unutaga kongreskato . . . . .	1,— ” ”
Unutaga karto por senlaboruloj . .	0,25 (kvarona) ned. guldeno.

### Oni skribu al.

Ĉiujn korespondaĵojn pri la kongreso — aliĝo aŭ informoj — oni direktu al la Ĝenerala sekretario-kasisto de „Nia Deknaŭa”:

S-ro F. MARREVEE, *Hugo de Grootstraat 76*, Hago (Nederlando). Ĝiro: No. 82984.

---

---

## DEKLARO:

„Ĝespero Katoliko” de Majo aperis tro malfrue, kvankam pli frue ol la Aprila numero.

En tio ne kulpas la ĉefredaktoro, kiu jam la 1an de Majo forsendis la kopion al la presisto.

Ni daŭrigos instigi la presiston, por ke E. K. ne nur aperu en bela vesto, sed ankaŭ je ĝusta tempo.

ĈEFREDAKTORO Esp. Kat.

---

---

## MEDEDELING.

Wegens ziekte van de Redacteur moeten enkele rubrieken in dit nummer achterwege blijven. Ook konden daardoor enkele inzendingen niet voor plaatsing worden gereedgemaakt.



## UIT DE AFDELINGEN.

### VENLO „Amikeco“.

Lia Episkopa Moŝto Mgr. Lemmens nomis Patron Drs. C. M. Nieuwhof O.E.S.A. la religia konsilanto de nia grupo. La instalado okazis en la kunveno de 16.4.

En Esperantlingva parolado Patro Nieuwhof i.a. diris ke li kiel lingvisto (gimnazia profesoro en la antikvaj lingvoj latina kaj greka) interesiĝis multe pri Esperanto kiel solvo de la mondlingva problemo, sed ankaŭ ke li estis konvinkita pri la granda utilo de Esperanto en la servo de la katolika Eklezio.

Post komuna kantado parolis Frato Florianus, kiu prelegis el propraj verkaĵoj originalaj kaj tradukitaj, ĉe kio li trovis atentan aŭdantaron.

### RAPORTINTO.

### GINNEKEN. Vaandelwijding „Por Mondpaco“.

Door bijdragen van vele Ginnekenaren en van de leden zelf is de benooidigde som voor onze vlag bijeengebracht.

Het bestuur besloot de vaandelwijding te combineeren met een filmvoorstelling. Zoo was op Zondag 2 Mei de groote patro-naatszaal geheel gevuld. Onder de aanwezigen bemerkten we den Burgemeester en verschillende Eerw. Geestelijken.

Vóór de pauze werden eenige bijfilmpjes vertoond.

Op het toneel, artistiek bekleed door de leden Heesbeen en Peskovsky, verrichtte toen onze geest. adviseur de plechtige vaandelwijding.

Tijdens de pauze werd gelegenheid gegeven de vlag te bezichtigen, waarbij de vervaardiger ons lid-kunstenaar Peskovsky, vele complimenten in ontvangst mocht nemen.

Na de pauze draaide de prachtfilm „Priester in Eeuwigheid“.

Ofschoon niet als zoodanig belegd, heeft de avond zeer propagandistisch gewerkt.

### SECR.

### DRIEHUIS. „Nova Vivo“.

La 21an de Aprilo „Nova Vivo“ okazigis sian 2an jarkunvenon. En la jarraporto la sekretario parolis pri la vigla klubvivo. La klubo okazigis en la pasinta jaro tri kursojn, tiel ke multaj personoj estas aniĝontaj al N.K.

La kasistino ĝojigis la membraron per la sciigo, ke ankaŭ la financoj de nia societo estas sanaj.

Ĉar la prezidanto memvole ekŝiĝis, la anoj elektis S-ron J. Peek, eksprez. de „Schiedam“, kiel prezidanton.

Oni decidis: partopreni en la venonta bicikloveturado al la „Bulbejoj”, laŭ invito de „Haarlem”; sendi la legitajn kaj nekonservatajn numerojn de „N.K.” al Katolikaj altranguloj en nia vilaĝo, por tiel interesigi ilin por Esperanto; fine oni starigis bicikloklubon.

La 10an de Majo ni festis la finon de la vintrokursoj. Humuristo zorgis por la bonsukceso. Muzikistoj trodorlotis la ĉeestantaron, precipe la gedancemulojn.

Laŭdegon al la festkomitato.

Ck.

#### **AMERSFOORT. „Pastro Emile Peltier”.**

Dinsdag 11 Mei hield onze ver. aan het eind van de cursus een vergadering. De heer v. Gasteren opende de vergadering met een toepasselijk woord tot de cursisten en tevens tot de heer Oostveen die ons moet verlaten. De heer Oostveen zei dat het hem spiet deze vereeniging te moeten verlaten, dankte bestuur en leden voor de prettige samenwerking en niet het minst de heer Brand voor zijn kundige en aangename leiding. Voorz. dankte en wenscht de heer Oostveen succes in Roozendaal.

Het voornaamste punt van de agenda was bespreking „Kongres”. Nog niet zeker was het of wij per spoor dan wel per autobus zouden gaan, echter allen gaan Zondags naar de Jaarvergadering. Voorts was er nog een verrassing op de agenda. De I.K.I.-bus werd opengemaakt en vooraf werd geraden hoeveel er in was. Vele prijzen waren ingekomen en werden gewonnen. Circa 10 uur sloot de voorz. de vergadering.

L. J. VOGELS, Secretaris.

#### **DEN HAAG. „Por Dio kaj Eklezio”.**

Maandag 10 Mei sloot deze afdeling zijn winterprogramma af met een feestavond.

Allereerst werden de clubdiploma's uitgereikt aan degenen, die zich met goed gevolg hadden onderworpen aan een der beide clubexamens. Uit elk der groepen trad een ex-cursist naar voren om de resp. cursusleiders te bedanken. Hierna volgde nog een reeks van korte, kernachtige toespraken, waarin o.m. hulde werd gebracht aan de voorzitter, voor zijn werk in de club en daarbuiten, en waarin voorts gelukwensen werden gericht tot twee leden der club, die zich kort tevoren verloofd hadden.

Onmiddellijk hierop volgde het nog vrolijker gedeelte, waarin dans, declamatie en spel elkaar afwisselden, en dat werd voortgezet tot middernacht.

SECRETARIS.

## DEN HAAG. „Inter Paco kaj Amo”.

Op Zondag 25 April had onze groote jaarlijksche feestavond plaats. Deze avond is wel het gloriepunt geworden in ons verenigingsjaar. Onze Geest. Adviseur de ZeerEerw. Pater M. v. d. Schoot O.F.M. gaf door zijn tegenwoordigheid blijk van zijn belangstelling. Zoo ook de afgevaardigde van verschillende zusterverenigingen.

De zaal, welke  $\pm$  450 personen kan bevatten, was overvol. De afd. tooneel welke uit de leden gevormd is, voerde met veel succes op: „*De truc van Jim*” en „*Het elfde Gebod*”.

Na de pauze werd een klein Esperanto stukje opgevoerd nml. „*La mallerta violonisto*”. Ook de tombola, welke 250 prijzen bevatte, was geheel door de leden bijeengebracht, zoodat ook financieel de avond schitterend geslaagd is. Deze avond, werd met een zeer geanimeerd bal besloten. Nog lang zal deze avond dan ook in herinnering blijven bij allen die hem meemaakten.

## DE SECRETARIS.

## DEN HELDER. „La Norda Lumo”.

La trian de Majo, nia klubo finis per festvespero sian unuan kurson.

La prezidanto malfermis per mallonga parolado la vesperon. Tiam la Junularo prezentis kelkajn teatraĵojn. Provecionon, deklamon kaj kiel fino la kanton de ĉiuj ĉeestantoj: „*Esperantisten aantreden*” per kiu la aŭtoro P. V. rikoltis multan sukceson.

En la paŭzo, oni prezentis al la „ina parto” teon, dume la sinjoroj ĝuis cigaron. Intertempe oni kolektis por la Pastro Poell Fondaĵo.

Post la paŭzo rev. moŝto kapalano van Ginkel petis la parolon. Lia moŝto diris ke li certe la lernanto estas, kiu la plej multaj fojoj ne povis viziti la kurson. Oni tamen petis lin danki la gvidanton de la kurso, kaj li volonte faris tion.

Parolanto tiam pentris, kio estis kaj ankoraŭ estas Th. v. d. Klaauw por nia kurso kaj finis, ne havante sufiĉe da vortoj, donante vortaron el la nomo de ĉiuj kursanoj.

Ankaŭ la knabklubo donis libron.

S-ro v. d. Klaauw dankis per kelkaj vortoj instigante al diligenta studado.

Num sekvis la teatraĵo „*Esperanto kaj Amo*” sekvite de la Geedziĝa horo el Lohengrin.

Speciale la lasta rikoltis tiom da sukceso ke la klubohoro devis kanti ĝin duafoje.

Per tiu ankaŭ finiĝis ĉi tiu sukcesplena vespero.

## LEIDEN. „R. K. Klubo Esperantista”.

La 28an de Aprilo la tri Leijdenaj Esperanto Unuiĝoj organizis festvesperon en „Zomerlust”. Tie ni publikigis la poentojn de la traduko, kiun S-ro Heilker elektis kaj korektis por ni. Denove la R. K. Klubo Esperantista gajnis la ŝanĝstelon. La tri partoprenintoj de la katolika klubo estis S-rino Bergers, F-ino Bernard kaj S-ro v. d. Meijden.

Infanoj ludis teatraĵojn Esperantlingve, poste ili kantis gajan Esperanto-kanton.

Diversaj Esperantistoj el aliaj urboj ĉeestis, inter alie la ĉefdelegito, S-ro Mooij, kaj S-ro Roland Dupuis.

En la paŭzo ni organizis amerikan loterion kaj vendis Esperanto-stelojn el „marcipano”.

Post la paŭzo la Federacio de Laboristoj Esperantistaj ludis teatraĵojn kaj komprenebla ankaŭ nia klubo.

Post komuna kantado S-ro Kleinhans, prezidanto de la festkomitato, fermis tiun ĉi vesperon.

## SEKRETARIINO.

## AMSTELVEEN. „Stelo de L’Paco”.

Ni kunvenis la 13an de Majo. La prezidanto bonvenigis la ĉeestantojn kaj diris i.a. „Estas bedaŭrinde, ke nia klubo estas nur malgranda; tamen ni ne perdu la kuraĝon. Ĉiu propagandu Esperanton; ĉiu propagandu nian propran klubon kaj precipe ĉiu propagandu I.K.L.-on. Laboru kaj sendube ni plenumos taskon en la granda katolika movado”.

En la paroŝa semajna gazeto „De Amstelsklokken” regule aperas artikoloj nederlandlingvaj pri I. K. I. kaj pri aliaj katolikaj Esperantaĵoj. En la anoncoj-gazeto „Het Amstelveense Weekblad” aperas nederlandlingva rubriko pri Esperanto.

La „Stelo Persdienst” (nia estraro) prizorgas la artikolojn.

La prezidanto insistas, ke ĉiu abonu „Espero’n Katolika’n” Katoliko ne legu t.n. neŭtralajn revuojn. Neŭtraleco ne povas ekzisti, ankaŭ ne en Esperantujo. Nia propra katolika organo estas tre bela, tre interesa, pli bona kaj malpli kara ol la aliaj revuoj. Neniu bedaŭros sian abonon. V.V.V. pligrandiĝis, tamen ankoraŭ ne estas sufiĉe granda. Ni helpu per niaj abonoj.

S-ro W. Scheerder estis elektata kiel delegito por la N. K. Jarkunveno, F-ino W. Blauwhoff estis elektata kiel anstataŭantino.

Post la naŭa komenciĝis la konversacia horo, kiun gvidis F-ino W. Blauwhoff. Ĉiuj estis tre kontentaj.

## LA SEKRETARIO.

## GRANDA LIMBURGA REGIONTAGO EN SITTARD.

Dimanĉon la *13an de Junio* okazos en la bela Limburga urbeto *Sittard* granda regiontago, al kies organizado kunlaboris 15 Limb. kluboj. La kongresejo estas Hotelo „Ober Baijern”.

Ĉi tie sekvas la oficiala programo:

- 10 Kunveno antaŭ la preĝejo. S. Miĥaelo sur la foirejo.
- 10<sup>3/4</sup> Sankta Meso kun prediko en Esperanto de Lia Moŝto. Profesoro A. Beckers, rel. Konsilanto de FUKĈ.
- 11<sup>1/2</sup> Oficiala Akcepto en la Urbdomo.
- 11<sup>3/4</sup> Fotografado sur la bordeso de la Urbdomo.
- 12-1<sup>1/4</sup> Libera Tempo.
- 1<sup>1/4</sup>-3 Laborkunsido dum kiu parolado de S-ro Filott. Je la sama tempo en alia salono parolado de S-ro Drs. Manders el Venlo pri „Esperanto kaj la Lingvosciencistoj”.
- 3-5 Ekskurso tra la plej belaj partoj de Sittard al la remlago.
- 5-6 Vera Limburga Kafotablo.
- 6-10 Agrabla Vespero, Plenigota per Teatraĵoj, deklamadoj, duetoj kaj kantado, ĉio en Esperanto. Plue Lia Moŝto, J. Jongen Em. Dekano de Eĉt parolos dum duonhoru pri „Esperanto kaj Religio”.

La Programo do estas vere inda, ke ĉiu Nederlanda Esperantisto ĉeestos.

Tial ankoraŭfoje urĝan peton al vi, kara leganto, veni al Sittard. La prezo de la kafotablo estas 60 cendoj. Aliaj kostoj ne estos. Anoncu vin por la kafotablo antaŭ la 10a de Junio ĉe la sekretario de la Limb. R. K. Esperantofederacio, Bosscherweg 103, Maastricht. Ankaŭ por eventuala hotelo vi povas anonci vin al ĉi tiu adreso.

---

### NEDERLANDA ESPERANTO-EKZAMENA KOMITATO.

UITSLAG ESPERANTO-EXAMEN A. Den Haag, 1 Mei 1937.

Er meldden zich aan voor dit examen 83 kandidaten, waarvan 28 werden afgewezen. Geslaagd 55.

De examens worden voortgezet voor diploma A en B te Amsterdam (19 Juni); Bergen op Zoom en Utrecht (6 Nov.) en 's-Hertogenbosch (20 Nov.).

Inlichtingen bij den secretaris, den heer H. J. Bulthuis, Kamillenstr. 37, Den Haag.

## INTERNACIA KATOLIKA INFORMEJO.

Ontvangen van de clubs: Molenberg, Tilburg, Amsterdam(O), Haarlem (A.R.), Utrecht, Gouda en Amersfoort samen 21,47 gld. Fr. B. te T. schonk 3 gld.; de Leereclub te A. 4,70 gld.; Mi mem 1 gld.; C. H. te R. 0,10 gld. Aan allen dank!

Toevallig kreeg ik in handen „Komunikoj”, oficiala organo de Nederlanda Katoliko, Novembro 1923. Daarin wordt een verslag gegeven over „Nia Oka”, 30 Juli 1923 te Nürnberg gehouden. In dat verslag lees ik:

La propono de Dro Smulders, kiu nun estas preparolata, estas jena: „I.K.U.E. starigu oficejon, al kiu senpage povas skribe interrilati ĉiuj nekatolikoj por ricevi skriban informon sur katolik-scienca kaj -religia kampo”. S-ro Schendeler aldonas la rimarkon de Dro Smulders: „En Nederlando ekzistas tia nacia oficejo. . . .” (Petrus Canisius). Aan pastro Preller werd toen door S-ro Schendeler verzocht het werk van P. C. uiteen te zetten. Dit gebeurde. En het verslag gaat dan verder: „Mons. Dro Giesswein deklaras, ke li post ĉi tiuj klarigoj devas laŭdi la proponon Smulders, dirante: kion oni faras en Nederlando, ni ankaŭ povas fari por la tutmonda katolikaro. . . .” Meerdere aanwezigen juichten het voorstel toe. Na enige besprekingen werd vastgesteld: . . . ke Breslaŭ baldaŭ komencu la laboron. Pastro Becker akceptas la oficejon, post kio la propono de Dro Sm. estas unanime akceptata”. Verschillende pastroj hebben zich toen als medewerkers opgegeven. Of dit besluit van „Nia Oka” ook verdere gevolgen heeft gehad, en het I.K.I. van 1923 ook gefunctioneerd heeft, weet ik niet.

Wel weet ik, dat onze tegenwoordige I.K.I. best functioneert en reeds meer dan 650 adressen van informpetantoj geboekt zijn.

Fr. M. MONULFUS.

I. K. I.-Secretaris, Giro 268507.

---

## SPREKERS VOOR PROPAGANDA - AVONDEN.

Herman J. Bosschert, Vancouverstraat 13 II, Amsterdam W.

P. Brand, Jutphaascheweg 92, Utrecht.

P. M. Brouwer, Pahudstraat 134, Den Haag.

F. J. v. d. Burgt, Auvergnestraat 41, Bergen op Zoom.

H. Damen, Brugstraat 10, 's-Hertogenbosch.

P. Heilker, Hoofddorp.

J. P. Korting, Tongelreschestraat 282 b, Eindhoven.

Pater Call. Preller O. P., v. Oldebarneveldstr. 91, Rotterdam.

J. H. Westen, Oppenheimstraat 54-a, Groningen.

Frater Wigbertus van Zon, Huize Steenwijk, Vught.

## KOMUNIKOJ DE LA KASISTO „PASTRO POELL-FONDAĴO”.

Ni, kun kora danko, mencias la jenajn mon-donacojn por la „Pastro Poell-Fondaĵo”, ricevitaĵn ĝis la 12-a de Majo.

M. G. en B.	Gld. 1,—
H. F. P. en H.	„ 2,50
M. G. en B.	„ 1,—
Inĝ. J. de H. en B.	„ 1,50
„Povo” en H.	„ 1,—
„Insula Dei” en A.	„ 2,50
P. F. v. V. en T. k. W.	„ 2,—
M. G. en B.	„ 1,—
Kolektita en la Festkunveno okaze de la fermo de la kurso en Den Helder	„ 3,36
Sume	Gld. 15,86

Kiu sekvas por pleniĝi la unuan sumon de *Gld.* 25,—?

Nia Ĝiro-numero estas *DEN HELDER 173910*.

Ni ankaŭ ricevis raporton pri fondo de Sub-komitato de la sekcio Maastricht, kaj legis en N.K. pri la fondita ŝparkaso en la sekcio Hago. „Por Dio kaj Eklezio” Ni deziras al ambaŭ multan sukceson, kaj kore dankas pro tiu imitinda kunlaboro.

Ĉu ĉiu sekcio-estraro jam priparolis nian cirkuleron?

TH. VAN DER KLAUW.  
Kasisto P. P. F.

### NoSoBE.

Sabaton, la 1an de Majo okazis en Amsterdam la oka jarkunveno de „NoSoBE”. El la jarraporto ni menciis, ke en 1936 la membro-nombro kreskis de 76 ĝis 87.

La preso de la brajla van Straaten-vortaro bone progresas: de la 13 volumoj nun jam 6 aperis.

Ĉar la elspezoj iom superis la enspezojn, ni decidis, ke okazos vigla agado por varbi pli da donacantoj inter la vidulaj gesamideanoj. Por plifortigi la interligon, ni eldonos por ili senpagan kvaronjaran informilon.

Envenis peto de la blindulkongresa komitato en Varsovio sendi delegiton al la dumkongresa ĝeneral-kunveno de UABO, kie gravegaj punktoj (porblindulaj profesioj, gvidhundoj, sonlibroj, blindeckompensoj, internacia informejo kaj statistikejoj) estos pritraktataj. Ĉar por „NoSoBE” sola la kostoj estas tro altaj, intertraktiĝos kun neesperantista blindulligo sendi komunan delegiton.

La prezidanto prelegis pri „Blindec-kompensoj”, t.e. pri ŝtata financa subteno, por helpe de ĝi plue perlaboro gajni la pro-

pran porvivoron. La blindulorganizoj vigle propagandu ĉi tiun ideon.

Kiel ĉiam la festvespero estis tre agrabla. Festparolanto estis Prof. O Julius Glück, kiu streĉe prelegis pri Grabowsky.

## NIA JUNULARO.

Koran dankon al ĉiuj, kiuj skribis al mi pri sia laboro, pri siaj spertoj kaj malsukcesoj. Jam mi sendis al ili personan respondon, sed la esencon mi preparolos en ĉi tiu rubriko.

Iu kursestro plendis: „Mi spertis, ke estas tute ne facile eduki knabojn kiel Esperantistojn.” Ĉi tiun plendon mi aŭdis pli malpli klare de diversaj aliaj fervoruloj. Tial ni atentu la fakton: *Estas malfacile fari Esperantistojn el geknaboj.*

Tio estas eĉ duobla malfacilaĵo, ĉar oni devas

1e. vekti daŭran intereson por Esperanto, kaj

2e. venki la lingvajn malfacilaĵojn.

Mi ne scias, kiu el la du estas la pli grava; sed mi jes scias, ke oni ne povas lernigi la lingvon nur per interesajoj (kiel ekzemple: ekskursoj, korespondado, kolektado de poŝtmarkoj, interŝanĝado de ilustritaj poŝtkartoj, festetoj, k.t.p.). Kaj same certe mi scias ke ankaŭ la plej simpla klarigado de gramatiko sole ne sufiĉas, ĉar la geknaboj devas havi sufiĉan intereson por lerni ĝin. Se viaj junaj lernantoj malbone lernas, malatente aŭskultas, malfavore vizitas la kunvenojn, vi atentu tiujn du postulojn, kaj verŝajne vi mem konstatos en kiu vi eraris.

Estas simple nur konstati la postulojn. Tamen pli grave estas doni gvidilon por ke neniu plu eraros. Bedaŭrinde, mi ne povas tion. Ne ekzistas recepto, laŭ kiu ĉiu povas agi kun 100%o certe. Mi povas nur doni konsilojn, laŭ kiuj vi eble havos bonan sukceson. Mi esperas ke la legantoj sendos al mi kompletigajn sciigojn, por ke ni atingu almenaŭ 99%oan certecon. Ju pli da gvidantoj kaj grupestroj skribos, des pli efika estos ĉi tiu rubriko!

En sekvonta artikolo ni preparolos la temon: *veku daŭran intereson*. Kiu bonvolas helpi? Mia adreso estas:

L. WEIJTS,

Fabianusstraat 43, Apeldoorn.

---

## TAALVRAAGSTUKKEN.

### A. TAALRUBRIEK VOOR BEGINNERS.

Uitwerking van Oefening 58.

1. Men noemt de geit vaak de koe der armen.

1. Oni ofte nomas la kaprionon la bovino<sup>1</sup>) de la malriĉuloj.



2. Tranen van vreugde kwamen in zijn ogen, toen hij na zoveel jaren zijn oude moeder wederzag.
3. Met gebroken mast en gescheurde zeilen kwam het schip na die storm de haven binnen.
4. De rivier is buiten haar oevers getreden.
5. Ik zette even mijn hoed af, om het zweet van mijn voorhoofd te veegen.
6. De rechter herhaalde de woorden van den getuige, om zich te overtuigen, of hij hem goed begrepen had.
7. Toen zij het doel van hun reis bereikt hadden, namen zij eerst een verfrissend bad.
8. Zijn schot miste; hij laadde opnieuw zijn geweer, maar toen was de haas niet meer te zien.
9. Na het avondeten steekt vader zijn pijp aan en leest zijn krant.
10. Toen de vergeetachtige jongen bij den kruidenier voor de toonbank stond, was hij zijn boodschappen vergeten.
11. Ik wil niet, dat ge weggaat en mij hier alleen laat.
12. Hij voelde zich de ongelukkigste mens van de gehele wereld.
13. Men noemt de kameel het schip der woestijn.
14. Toen de dienstbode de kamer uitging, liet ze de deur open.
15. De stakers vonden de voorgestelde verbeteringen niet
2. Larmoj de ĝojo venis en liajn okulojn, kiam li post tiom da jaroj revidis sian<sup>2)</sup> maljunan patrinon.
3. Kun rompita masto kaj ŝiritaj veloj la ŝipo post tiu ventego venis en la havenon<sup>3)</sup>.
4. La rivero superbordiĝis<sup>4)</sup>.
5. Mi momenton<sup>5)</sup> demetis mian ĉapelon, por viŝi<sup>6)</sup> la ŝviton de mia frunto.
6. La juĝisto ripetis la vortojn de la atestanto por konvinki sin<sup>7)</sup> ĉu li bone komprenis<sup>8)</sup> lin.
7. Atinginte la celon de sia<sup>9)</sup> vojaĝo, ili unue prenis refreŝigan banon.
8. Lia<sup>10)</sup> pafo maltrafis; li denove ŝargis<sup>11)</sup> sian pafilon, sed tiam la lepero ne plu estis videbla.
9. Post la vespermanĝo la<sup>12)</sup> patro ekbruligas sian pipon kaj legas sian ĵurnalon<sup>13)</sup>.
10. Kiam la forgesema<sup>14)</sup> knabo staris ĉe la spicisto antaŭ la vendotablo li estis forgesinta siajn komisionojn.
11. Mi ne volas, ke vi foriru<sup>15)</sup> kaj ke vi lasu<sup>15)</sup> min sola tie ĉi.
12. Li sin sentis la plej malfeliĉa homo<sup>16)</sup> de la tuta mondo.
13. Oni nomas la kamelon la ŝipo<sup>16)</sup> de la dezerto.
14. Kiam la servistino eliris el la ĉambro, ŝi lasis la pordon malfermita<sup>16)</sup> 17).
15. La strikantoj opiniis la proponitajn plibonigojn ne sufiĉaj<sup>18)</sup>

#### OPMERKINGEN.

1) Bovino zonder *n*, want 't is een bepaling van gesteldheid. (Deze bepaling onderscheidt zich in 't Esperanto van de andere bep., dat ze nooit een *n* krijgt).

2) *Sian* met een *s* vooraan, want 't woord staat in een bepaling en slaat terug op 't onderwerp van dezelfde zin.

3) Ook: *enhaveniĝis*.

4) Ook: *transbordiĝis*.

5) Ook: *dum momento*.

6) *Viŝi* ook *forviŝi*.

7) *Konvinki sin* en niet: *konvinkiĝi*. De handeling is hier gewild uitgaande van 't onderwerp en dan gebruikt men *sin* in plaats van *iĝi*.

8) Geen samengestelde tijd! *Komprenis* is beter en ook mooier. Die onnodige samengestelde tijdsvormen maken de stijl stijf.

9) In deze zin is 't onderwerp weggelaten. In dergelijke gevallen moet men de zin volledig maken en er een onderwerp inbrengen. Dus: *Kiam ili...* *Sia* slaat nu terug op 't onderwerp.

10) Geen *sia* hier. In 't onderwerp staat *nooit sia!*

11) *Ŝargis* is laadde van een geweer; *ŝargi* = laden van lasten op iets.

12) Ook *mia, nia*.

13) *Ĵurnalon* of *gazeton*.

14) Hier moet 't achtervoegsel *em'* gebruikt worden. 't Is 'n karaktertrek van den jongen, 'n *blijvende neiging*.

15) De aanvoegende wijs na 't werkwoord *voli* in de hoofdzin.

16) Bepaling van gesteldheid!

17) De gehele zin kan ook aldus luiden. *La servistino lasis la pordon malfermita, elirante la ĉambron.*

18) Meervoud! want 't woord behoort bij *plibonigojn*. Bepaling van gesteldheid!

### Oefening 59.

1. Wij zouden gaan fietsen, maar men raadde het ons af, want het weer was nog niet vast.

2. De boekhandelaar zei, dat hij de boeken dadelijk zou bestellen.

3. Indien hij zijn portemonnaie verloor, zou hij maar weinig geld verliezen, want er zitten maar een paar centen in.

4. Als iemand in deze afgrond viel, zou hij dadelijk dood zijn.

5. Als hij verlof kon krijgen, zou hij morgen met de boot naar Engeland vertrekken, om er de feesten bij te wonen.

6. Hoe zouden wij ons verheugen, als Esperanto ingevoerd werd op de scholen.

7. Onze propaganda zou meer succes hebben, als wij over meer geldmiddelen konden beschikken.

8. Als wij U niet kenden als een eerlijk mens, zouden wij geloven, dat U liegt.

9. De koning zou al zijn geld uitgeven om maar mooi gekleed te zijn.

10. Indien men bijtijds had gewaarschuwd, zouden niet al die mensen verdronken zijn.

11. Het regende die dag van de morgen tot de avond; toch verveelden we ons niet.
12. Dat boek is zeer aanbevelenswaardig; de inhoud is mooi en de stijl eenvoudig.
13. Hoewel zij reeds meer dan een jaar hier wonen, gevoelen zij zich nog vreemdelingen.
14. Onze gastvrouw deed al het mogelijke, om ons 't verblijf te veraangename.

Inzendingen met geadresseerde en gefrankeerde enveloppe voor terugzending, vóór 16 Juni aan:

J. J. FILOTT, Willemstraat 91, HEERLEN.

## B. TAALRUBRIEK VOOR MEER GEVORDERDEN.

### Traduko de Ekzercaĵo 9.

Balthazar signifoplene alrigardis siajn kunvojaĝantojn kaj tiam li denove direktis sin al la virino:

„Ĉu eble<sup>1)</sup> vi povos diri min, kie troviĝas la naskiĝinta<sup>2)</sup> Reĝo de la Judoj?“

Mirigite<sup>4)</sup> la virinoj alrigardis unu la alian. „Ĉu vi do ne aŭdis pri li?“

„Ne, Sinjoro“.

„Nu do, rakontu al ĉiu, ke en la Oriento ni vidis lian stelon, kaj ni venis por adori Lin“.

Irante plue<sup>5)</sup>, ili direktis al multaj la saman demandon, sed ĉiam kun la sama rezultato.

Nun ili baldaŭ rajdis tra la Damascus-pordego<sup>6)</sup>, kie Romana soldato gardestaris (postenis).

Kelkaj scivoluloj<sup>7)</sup> estis aliĝintaj al ili, tiel ke, kiam la Egipto haltis por ĉe la gardestaranto peti informojn, la vojaĝantoj fariĝis la centro de ĉiam kreskanta popolamaso. „Paco estu kun vi“, la Egipto diris. Li ne ricevis respondon. „Ni venis de malproksime por serĉi la naskiĝintan Reĝon de la Judoj. Ĉu vi povos diri al ni, kie li estas?“

La soldato levis la vizieron<sup>8)</sup> de sia kasko kaj laŭtvoĉe vokis ion en la direkto de la gardistejo. Kun la vortoj: „For de tie“, aperis nun oficiro, kiu malĝentile komprenigis al la antaŭenpuŝiganta homamaso, ke ĝi faru lokon al li. „Kio estas via deziro?“ li demandis al Balthazar.

„Mi volus<sup>9)</sup> scii, kie estas la naskiĝinta Reĝo de la Judoj?“

„Ĉu Herodes?“ la estro mirigite demandis.

„Herodes estis enoficigata de la Imperiestro; lin ni ne serĉas“.

„Ne estas alia reĝo de la Judoj“.

„Certe; ni vidis lian stelon kaj venis por adori lin“.

La Romano komprenis neniom pri tio<sup>10)</sup>.

#### Rimarkoj:

1) *ook signifas ankaŭ* kiam okazis jam io alia; sed ĉi tie *ook* signifas: *misschien* = eble.

2) Ne: *naskita*; ĉar *naski* = *baren*; geboren worden = *naskigi*.

3) Ne: *Juda Reĝo* = Joods Koning, tio estas: de Juda deveno.

4) Ne: *mirige*; *mirige* signifus, ke la virinoj igis miri aliajn; tamen la okazintaĵo mirigis la virinojn, kaj ili rigardis *mirigite*.

5) Pri *plue* vidu la N.K.-numeron de Aug. 1936.

6) Rajdi *tra* la pordego: Z. konsilas uzi post *tra* la *n* nur kiam ĝi estas necesa por la komprenigo de la frazo.

7) scivolemuloj = estas personoj, kiuj *ĉiam* havas la *emon*

8) *vizier* de kasko, estas *viziero*; — de pafilo, estas *celilo*.

9) Ik *wilde* weten, ne estas *pasinteco*; la signifo estas: ik zou willen weten (indien zulks mogelijk is) = Mi volus scii.

10) *niets*, betekent hier: *hoeveelheid*, do *nieniom*.

### Ekzercaĵo 11.

*Examen B.* Den Haag, 8 Mei 1937. (Voormiddag).

Na een huwelijksreis van precies een kwartaal zijn Prinses Juliana en Prins Bernhard in het vaderland teruggekeerd. Dat zij naar hartelust genoten hebben, heeft ons volk kunnen lezen uit de persberichten en kunnen zien uit de foto's. En wie onzer heeft het hun niet gegund? Er zullen, menselijkerwijze gesproken, nog jaren genoeg komen, waarin zij kennis zullen maken met de ernst, de zorgen en de moeilijkheden van hun leven en van hun taak. Het is op zichzelf reeds verheugend, dat de omstandigheden het de troonopvolgster vergunden, zolang afwezig te blijven. Maar nu ze terug zijn, zal men gauw genoeg bespeuren, dat zij aan het openbare leven van ons volk gaan deelnemen. Trouwens, nauwelijks had Prins Bernhard zijn voeten weer op de bodem van zijn nieuwe vaderland gezet, of hij werd geïnstalleerd als lid van de Raad van State, waartoe hij, naar men weet, op zijn huwelijksdag door de Koningin is benoemd. Door deze benoeming maken thans alle vorstelijke personen deel van de Raad uit. De Koningin is er voorzitter van (al laat zij de leiding steeds aan den vice-voorzitter over), de Prinses zit er krachtens een grondwettelijke bepaling en de Prins is er in benoemd. En nu is dan Soestdijk — of liever de gemeente Baarn — in werkelijkheid de prinselijke residentie geworden. Ook is onlangs een eind gemaakt aan de twijfel, of het prinselijk paar bij eventueel verblijf in Den Haag wellicht het paleis aan de Kneuterdijk zou betrekken. Dit paleis is naar men weet aan de Friese Levensverzekeringmaatschappij verkocht. Zulke maatschappijen schijnen het op paleizen voorzien te hebben. De Eerste Nederlandse toch zetelt in het vroegere paleis van Prins Frederik (hoek Princessegracht en Voorhout), bekend en vermaard als het „Huis aan de Boskant”. En nu komt de Friese in de bocht van de Kneuterdijk, waaromtrent vele jaren de gedachte heeft bestaan, dat de Prinses er zou gaan wonen.

FRATER WIGBERTUS VAN ZON L.K., Vught.